

# Informilo de Januaro 2017

Numero 26, januaro 2017

## Du novaj Esperanto-retejoj informas pri Unuiĝintaj Nacioj

**17 decembro 2016.** Dank' al diligenta laboro de Robin Hill, ano de la Novjorka laborgrupo pri Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ni komplete renovigis la retejon [www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org), kiu informas pri nia laboro ĉe UN. La retejo nun enhavas, interalie:

- prezenton de la homoj kiuj kunlaboras en la rilatoj UEA/UN
- klarigon pri niaj celoj kaj agado
- prezentojn de nia vidpunkto pri demandoj sur la tagordo de UN
- priskribon de la strukturo de UN kaj aliaj aspektoj de la UN-laboro
- historian prezenton de la oficialaj lingvoj de UN
- Esperantlingvajn tradukojn de UN-dokumentoj
- dokumentojn de UEA direktitajn al UN
- arkivon de la informiloj de la UN-oficejo de UEA, en Esperanto kaj la angla
- terminaron Esperantan-anglan kaj anglan-Esperantan pri UN kaj rilataj demandoj
- inviton al kunlaboro

Ni invitas vin viziti la retejon kaj esplori ĝian enhavon.

**UN esperante** (<https://unesperante.wordpress.com>) estas nova blogo de brazila esperantisto Rafael Lima kaj de Andrej A. Peĉenkin, kiu prezentas aktualajn novaĵojn pri la laboro de UN en Esperanto-traduko. Aperas preskaŭ ĉiutage nova raporto pri iu aspekto de la programoj de UN. Ne pre vizitu ĝin kaj komentu la artikolojn. Ni invitis Rafael fariĝi kunlaboranto de Esperanto por UN.

## Grava nova libro: Fundamento de la homaj rajtoj

**16 decembro 2016.** Universala Esperanto-Asocio hodiaŭ aperigis belan poŝformatan libreton *Fundamento de la homaj rajtoj* okaze de grava datreveno. Antaŭ precize 50 jaroj, la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UN) akceptis du gravajn internaciajn traktatojn; ili estas la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, kaj la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj. Esperanta traduko de la Universala Deklaracio ekzistas jam de multaj jardekoj, kaj estas legebla en la UN-retejo. La du Paktoj, tamen, aperas nun unuafoje en Esperanta traduko. La tradukadon faris d-ro Humphrey Tonkin, iama UEA-prezidanto kaj gvidanto de ĝia Novorka Oficejo, kaj liajn tekstojn kontrolis Brian Moon, profesia tradukisto ĉe Eŭropa Komisiono. Ĉiuj tri tekstoj estas kunigitaj en la libreto, kiu inkluzivas antaŭparolon de la Prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes, kaj kleran enkondukan eseon de d-ino M. Rafaela Urueña, profesoro pri la internacia juro. "Ĉi tiu libreto estas omaĝo al la longa komuna historio de Esperanto kaj la homaj rajtoj en monda skalo", klarigas d-ro Fettes. "Eldonante libroforme la tekstojn de tiu triparta fundamento de la homaj rajtoj, ni esperas rekonsciigi esperantistojn pri ilia graveco, kaj fari plian modestan kontribuon al iliaj diskonigo kaj efektivigo". La libro estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA por 6,90 EUR plus sendokostoj (triona rabato ekde tri ekzempleroj).

## Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Homaj Rajtoj

**10 decembro 2016.** Okaze de la ĉi-jara Tago de Homaj Rajtoj, Universala Esperanto-Asocio publikigis Deklaron pri la graveco de homaj rajtoj ĝenerale, kaj specife en la laboro de la Asocio. La Deklaro, kiu estis transdonita ankaŭ al Unuiĝintaj Nacioj, tekstis jene:

*La 10-a de decembro estas la Internacia Tago de Homaj Rajtoj. Ĉi-jare ni festas la 68-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la plej fundamenta kaj ampleksa atesto de interkompreniĝo pri individuaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj iam ajn atingita.*

*Esperanta traduko de la Deklaracio estas delonge legebla en la oficiala retejo de Unuiĝintaj Nacioj:*

<http://www.ohchr.org/EN/UDHR/Pages/Language.aspx?LangID=1115>. Ĝi restas koninda por ĉiu esperantisto.

*Universala Esperanto-Asocio fieras pro sia asociiĝo kun la Universala Deklaracio. Jam pli ol unu jaron antaŭ la fina ratifo de la Deklaracio en decembro 1948, la Asocio enkondukis paragrafon en sia Statuto, laŭ kiu la homaj rajtoj estas "esenca antaŭkondiĉo" por ĝia laboro por internacia komunikado kaj interkompreniĝo. Tra la postaj jardekoj, UEA vaste uzis Esperanton por informi niajn membrojn tra la tuta mondo pri la graveco de homaj rajtoj kaj por instigi ilin disvastigi tiun mesaĝon en la propraj komunumoj.*

*Venante tuj post la fino de unu el la plej grandaj konfliktoj en la homa historio, la Universala Deklaracio markis raran momenton de unuanimeco en la internacia komunumo. Tiun unuanimecon UEA firme deziras konservi, protekti kaj restarigi en la nuna periodo de internacia malcerto kaj streĉiteco, kiam la kapabloj por konstrui pli bonan mondon tiel abundas kaj la obstakloj al ties atingo estas tiel malfacile superblaj. Ni salutas Unuiĝintajn Naciojn kiel gvidlumon de espero en afliktata mondo, kaj ni renovigas nian promeson kunhelpi en antaŭenigo de internacia kompreno en spirito de egaleco, malferma debato, kaj praktika helpo al la suferantoj.*

## Esperantista junulara organizaĵo TEJO ekgvidas kunordigan strukturon pri tutmonda junularo

**16 novembro 2016.** Lige al UNFCCC COP22 (UN Kunveno pri Klimatshangho) estis organizita en Marakeŝo, Maroko, la jarkunveno de Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizaĵoj (IKRJO), kiu grupigas la kontinentajn junularajn platformojn, kaj la plej grandajn internaciajn tutmondajn junularajn organizaĵojn.

TEJO estis konfirmita en ties plenumorgano, kaj ekhavas gvidan rolon en ĝi. Aliaj organizaĵoj en la plenumorgano estas YFJ (Forumo Junulara-Europa), YWCA (Asocio de Junaj Kristanaj Virinoj), IFMSA (Internacia Federacio de Asocioj de Medicinaj Studentoj), IFM-SEI (Internacia Falk-Movado – Internacia Socialisma Edukado) kaj IYCS (Internaciaj Junaj Katolikaj Studentoj).

“Ni jam laboras por surtabligi en UN gravajn temojn, kiel ekzemple la aktiva engaĝigo de junularo en la planado kaj agadoj rilataj la Daŭripovajn Evoluigajn Celojn”, komentas Francesco Maurelli. “Nome de IKRJO en la venontaj tagoj mi sendos leteron al S-ro Frederick Shava, Prezidanto de EKOSOK, cele al kunlaboro kadre de la januara Junulara Forumo ĉe UN Novjorko”.

“Mi fieras pri la laboro de TEJO en Eksteraj Rilatoj”, aldonas Michael Boris Mandirola, prezidanto de TEJO kaj respondeculo pri KER. “Tiu ĉi atingi montras kiom TEJO estas serioze konsiderata tutmonde. Ni plulaboru kunlabore kun la tutmonda junularo por konstrui pli justan mondon.”

Se vi volas finance subteni la agadon de TEJO pri eksteraj rilatoj, bv. konsideri donaci tra UEA kun priskribo: “TEJO-KER” (UEA-konto: tejker). Pagmanieroj estas priskribitaj ĉe [http://uea.org/alighoj/pag\\_manieroj.html](http://uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)

## Novjorka prelegserio omaĝe al Tivadar Soros daŭras en la jaron 2017

**16 decembro 2016.** Esther Schor (Universitato Princeton) estis la unua parolanto en prelegserio memoriga al Tivadar Soros, kies du libroj verkitaj en Esperanto, *Modernaj Robinzonoj kaj Maskerado ĉirkaŭ la morto*, rakontas pri la travivaĵoj de la aŭtoro en respektive la Unua kaj Dua Mondmilitoj. La prelegserio, kiu okazas en la angla lingvo, prezentas la laboron de pluraj universitatanoj el la Novjorka regiono, kiuj okupiĝas pri studoj kiuj rilatas al Esperanto kaj planlingvoj.

Profesoro Schor prezentis sian novan verkon *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language* (Ponto el vortoj: Esperanto kaj la revo de Universala Lingvo. Metropolitan Books, 2016). Enkonduke al tiu prelego, Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford, Konektikuto) prezentis la vivrakonton de Tivadar Soros kaj lian rolon en la Esperanto-movado, aludante ankaŭ al la fakto, ke Soros estis patro de la konata financisto George Soros. La familio Soros, kiu subtenas la prelegserion, estis reprezentita de Daisy Soros, vidvino de Paul Soros, la plia aĝa frato de George.

La prelegserio, administrata de Esperantic Studies Foundation, okazas sub aŭspicio de la Programo pri Lingvistiko ĉe la Postdiploma Centro de la Urba Universitato de Novjorko, 365 Kvina Avenuo (ĉe 34-a Strato). La dua prelego, prezentita de Michael D. Gordin, profesoro pri historio ĉe la Universitato Princeton, okazos tie vendredon, la 10-an de februaro, 2017, en salono 9205 je la 4-a ptm. La temo de profesoro Gordin estos “La lingvo de Einstein: Eltrovo kaj perdo de Gloro” kaj la prelego pritraktos la kontribuon de Max Talmey, la fondinto de la Novjorka Esperanto-Societo, al la planlingva movado.

Profesoro Gordin lastatempe verkis *Scientific Babel: How Science Was Done before and after Global English* (2015).

La tria prelego en la serio, de Brigid O’Keeffe, profesoro pri historio ĉe Kolegio Brooklyn de la Urba Universitato de Novjorko, pritraktos la temon “Konversacioj en la socialista estonteco: Esperantistaj delegacioj al la frua Sovetunio”. Ĝi okazos vendredon la 10-an de marto en la samaj loko kaj horo.

Pliaj informoj haveblas ĉe: [www.soroslectures.org](http://www.soroslectures.org).

## Nova retejo de E@I pri la Manifesto de Prago

**15 decembro 2017.** Okaze de la Zamenhof-festo E@I lanĉis novan retejon, kies ĉefa celo estas prezenti diverslingve la enhavon de la Manifesto de Prago en vigla, moderna maniero. La paĝon <http://manifesto.ikso.net> realigis itala volontulo Edoardo Nannotti kadre de sia EVS (Eŭropa Volontula Servo) en E@I.

Ĉi-jare la Manifesto iĝis 20-jara, sed nenion perdis pri sia valoro kaj mesaĝo. Kiel diras Peter Baláž, kunordiganto de E@I: “Manifesto de Prago estis por mi unu el unuaj dokumentoj, kiun mi pri Esperanto kaj ties movado legis. Laŭ mi ĝi tre trafe kaj samtempe skize prezentas ĉefan mesaĝon de la Esperanto-movado, parolas pri lingva demokratio, diverseco kaj homa emancipiĝo – temoj daŭre tre gravaj kaj aktualaj”. Laŭ la manifesto mem, ĝi estas deklaro de “anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto” kaj direktiĝas “al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo”. Ĝi rekonfirmas la tradiciajn celojn de la Esperanto-movado kaj detaligas en sep principoj starpunktojn pri Esperanto.

La Manifesto prezentas do sep principojn, kiujn ĝi “konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo”. Ankaŭ per tio la Manifesto esprimas, ke ĝi celas alian lingvan ordon ol la nunan, nome la ĝeneralan enkondukon de Esperanto tradicie nomatan fina venko. Kiel aldonas Peter Baláž: “Ĉu jam iam la fina venko okazos aŭ ne, la Manifesto de Prago estas tre interesa kaj pensiga dokumento, kiu havas sian gravan lokon en la Esperanto-movado. Tial ankaŭ ekestis tiu ĉi retejo, kiu celas per atentokapta, alloga maniero prezenti ĝin diverslingve al la nuntempa publiko”. Prepariĝas pliaj partoj por la retejo, plano estas ekzemple liveri la dokumenton kiel elŝuteblan afiŝon aŭ faldfolion en PDF por presado aŭ plia reta uzo. (*El Ondo de Esperanto*, januaro 2017).

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041

[www.esperantoporun.org](http://www.esperantoporun.org)

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations

777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.

212-687-7041